


Siberia go-tendaro



Efremov Roman javaharlalneru@mail.ru

La tendaro okazis ekde la 1-a ĝis la 11-a de junio en arbara ripozbazejo apud la urbo Novosibirsk. Ni loĝis en malgrandaj dometoj ĉe bela naturo, apud la bordo de vasta rivero. Kolektiĝis nur 13 homoj, sed iusence tiu malgranda kvanto de partoprenantoj estis bona, ĉar la instruistoj povis doni pli multe da atento al ĉiuj lernantoj.

Nia ĉefa instruisto estis Kim Jung-Hyop, eksa korea insejo, kiu nun studas en universitato de Baduk en Seulo kaj dum unu jaro loĝis en Rusio laŭ programo de studenta interŝanĝo. Laŭ la rusa kvalifikaro li estas 8 dan kaj nun okupas la 1-an pozicion en la listo de rusiaj ludantoj. Lia lud-nivelo estas tre proksima al la nivelo de profesiuloj. Krom li, la tendaron partoprenis ankaŭ tri dan-niveluloj (2-4 dan) el diversaj urboj de Rusio – Pavel Pristupa, Anna Kruŝinskaja kaj Miĥail Svjatlovskij. Ĉiuj aliaj partoprenantoj estis kju-niveluloj, kaj mi estis unu el la plej malfortaj. Do preskaŭ ĉiu homo tie povis iom insrtui min pri la ludo.



forta grupo, kaj la malvenkinto malsupreniris. Vespere okazis praktikaj lecionoj – solvado de taskoj kaj lud-problemoj, pridiskutado de luditaj partioj, personaj paroladoj de instruistoj kaj lernantoj. 2-foje okazis samtempaj ludoj de niaj majstroj kontraŭ kelkaj ludantoj. Kelkfoje ni ludis partiojn ĉe la river-bordo, aŭskultante bruon de ondoj kaj apuda arbaro – tio estis vere agrablaj momentoj. Fojfoje ni lasis goon kaj okupis nin pri diversaj sport-ludoj, komuna kantado kaj solenaj vespermanĝoj ĉe lignofajro.



la venontjara somero pasigi kelkajn tagojn ĉe bela naturo, ludante goon – bonvenon al Siberio!

Preskaŭ la tuta tempo estis dediĉata al go-ludo. Matene okazis lekcioj pri tipoj de fuseki, manieroj de atako kaj defendo, truk-metoj ktp. Posttagmeze okazis ludoj – ni estis dividitaj je grupoj laŭ lud-nivelo, kaj ĉiutage la venkinto de la grupa turniro supreniris al pli

Do, la evento certe estis utila kaj ĝojiga por ni ĉiuj. Mi kredas, ke la lud-nivelo de ĉiu partopreninto altiĝis, kio estos videbla dum venontaj turniroj. La organizantoj de tiu tendaro planas fari ĝin ĉiujara evento, do se vi volas dum

Amike kaj bondezire, Roman

Leteroj el Rusio

Mi legis la novan kajeron de "Go-amiko" kun ĝojo: la ĵurnalo grandiĝis, aperis multe da kontribuoj el diversaj landoj. Mi montris ĝin al tiuj ludantoj, kiuj aperis sur miaj fotoj. Ili tre entuziasmiĝis pro sia apero sur paĝoj de la internacia ĵurnalo. Nun mi partoprenas "handikapan go-maratonon" en Iĵevsk, ni ludas ĉiun dimanĉon de aprilo, post 6 partioj mi havas 3 venkojn kaj 3 malvenkojn. Komence de majo mi partoprenos grandan Esperanto-renkontiĝon "EsPrimo-11" en la urbo Ĉelabinsk (Urala regiono) kaj tie aranĝos lecionon de go-ludo por esperantistoj. Komence de junio go-ludantoj de Siberio organizos grandan go-tendaron apud la urbo Novosibirsk. Kelkaj spertaj trejnistoj instruos ludantojn dum 10 tagoj en bela ripoz-bazejo. Mi strebos partopreni ĝin.

La 8-an de marto venis bona novaĵo por la rusia go-movado: rusa ludanto Ilia Ŝikŝin (8 dan amatora) iĝis profesiulo (1p) de la nova Eŭropa Pro-Asocio. Tiutage finiĝis la sinsekva kvalifika turniro, Ilia ludis la lastan partion kaj devis tuj forflugi hejmen. La partio estis longa kaj finiĝis je 40 minutoj antaŭ la flugo. Feliĉe la flughaveno estis proksime al la loko, kie oni ludis, kaj li sukcesis trafi la flugon. Tiu manko de tempo tamen ne helpis al lia rivalo - Cornel Burzo el Rumanio, Ilia estis trankvila kaj gvidis la partion al venko. Mi sendas al vi la SGF-dosieron de tiu partio. Se vi volas, bonvolu spekti ĝin kune kun sinjoro Sakurai kaj aliaj fortuloj de JEGA kaj verku viajn komentojn por la sekva kajero de "Go-amiko".

Nun en la Eŭropa Go-Asocio estas 4 profesiaj ludantoj (ĉiuj – 1 dan pro) - Pavol Lisy (Slovakio), Ali Jabarin (Israelo), Mateusz Surma (Pollando) kaj Ilia Shikshin (Rusio). Jen la foto:

https://scontent-fra.xx.fbcdn.net/hphotos-xap1/v/t1.0-9/11038404_10152772321162887_131815902473225937_n.png?oh=f1792196663e1c2d25b8c6ae8fa2964e&oe=55753C21

Amike kaj estime, Roman Efremov